Nach den Arbeiten von C.v.d.Malsburg und D.Willshaw sowie von M.Constantine-Paton und M.I.Law werden die ersten Verbindungen, die sich früh in der Ontogenese bilden, durch Chemoaffinität geleitet. Man nimmt an, daß ein Gradient von Oberflächenmarkern auf den Zellen der Eingangsebene (und damit auch den auswachsenden Axonen) existiert. Ein zweiter solcher Gradient auf den Zellen der Ausgangsebene gibt dann den auswachsenden Axonen die Information, mit welcher Zelle sie synaptisch in Verbindung treten können.
Da die Axone relativ breit streuen, dürfte die Wirkung der Gradienten nicht sehr ausgeprägt sein.
Mit der Öffnung zur Umwelt setzt dann die zweite Differenzierung ein. Die Relation zwischen der Eingangs- und der Ausgangsebene wird akzentuierter und gewinnt an Gestalt, Gestalt, die in codierter Form Wissen über die Umwelt speichert. Die obigen Autoren weisen insbesondere darauf hin, daß in dieser Phase durch Kooperation zwischen den einzelnen Beziehungen eine topographische (d.h. nachbarschaftserhaltende) Relation zwischen den beiden Ebenen entsteht.
Schließlich sollte es zumindest beim Menschen möglich sein, daß eine dritte Strukturierung stattfindet, in deren Verlauf andere Gebiete des Gehirnes auf das Ebenenpaar einwirken. Dies wurde oben als höheres Lernen bezeichnet.

Schlußbemerkung

Das kooperative Paradigma behauptet, daß das Gehirn aus mehreren Schichten kooperativer Systeme besteht, von denen eine auf die andere aufbaut.
Wie oben erwähnt, muß man davon ausgehen, daß die synaptischen Verbindungen selbst wieder die Elemente eines neuen kooperativen Systems sind. Die Zustände, in denen sie variieren können, sind ihre Gewichte. Die Nachbarschaft einer synaptischen Verbindung besteht aus denjenigen synaptischen Verbindungen, die mit der ersten entweder das Eingangselement oder das Ausgangselement teilen.






Bild 7: Die Nachbarschaft (gestrichelt gezeichnete synaptische Verbindungen) einer synaptischen Verbindung (durchgezogen gezeichnet)

Diejenige synaptische Verbindung, bei der das Ausgangselement kurz nach dem Eingangselement aktiviert wird, erhöht ihr Gewicht um ein Geringes (siehe Hebbsche Regel). Diese Gewichtszunahme hängt von den Gewichten der Nachbarn ab.
Wichtig ist, daß jeweils nur wenige synaptische Verbindungen ihr Gewicht ändern und

zwar ohne jede zeitliche Ordnung. Aufgrund dieser nicht bekannten zeitlichen Variablen kann die Entwicklung des Systems nicht vorausberechnet werden, d.h. das System nimmt einen geschichtlichen, einmaligen Verlauf. Lernfähige Systeme haben also alle eine individuelle Geschichte, die sie von allen anderen lernfähigen Systemen unterscheidet.

Zusammenfassung

In dieser Arbeit werden die Bedingungen untersucht, die Lernen möglich machen: Ein informationsverarbeitendes System, welches mit seiner Umwelt kommuniziert und durch Eigenaktivität vorangetrieben wird, entwirft mit Hilfe einer Anfangsstruktur und Regeln Hypothesen, die ggf. durch eine Erfolgsmeldung gesichert oder durch einen Mißerfolg entwertet werden.
Anschließend werden die neuronalen Netzwerke seit W.S.McCulloch und W.Pitts sowie D.O.Hebb auf ihre wichtigsten Eigenschaften untersucht.
Zum Schluß wird ein eigenes Modell beschrieben und zur Veranschaulichung ein kurzes Computerprogramm herangezogen.

Schrifttum

ALBUS,J.S.: Brains, Behavior & Robotics, Peterborough, N.H. 1981, BYTE Books.
CHOMSKY,N.: Aspects of the theory of syntax, Cambridge (Mass.) 1965, MIT-Press.
CONSTANTINE-PATON,M. u. LAW,M.I.: The development of maps and stripes in the brain. Sci. Am. Dec.1982, 54-62.
v.DITHFURT,H.: Der Geist fiel nicht vom Himmel, Hamburg 1976, ^{2}1979, Hoffmann u. Campe.
ECCLES,J.C.: The Human Psyche. The Gifford Lectures, New York 1980, Springer.
ECCLES,J.C.: The modular operation of the cerebral neocortex considered as the material basis of mental events. Neuroscience Vol 6, No 10, 1839-1856, 1981.
FISCHER,G.: Kognitions-Wissenschaft, Bild der Wissenschaft, 6,1982
FUKUSHIMA,K.: Cognitron: a self-organizing multilayered network. Biol.Cyber. 20(1975), S.121-136
FUKUSHIMA,K.: Neocognitron: a self-organizing neural network model for a mechanism of pattern recognition unaffected by shift in position. Biol.Cyber. 36(1980), S.193-202
GIERER,A.: Development of projections between areas of the nervous system. Biol.Cyber. 42 (1981), S.69-78
HARTMANN,N.: Der Aufbau der realen Welt, Berlin 1964, de Gruyter.
HASSENSTEIN,B.: Instinkt, Lernen, Spielen, Einsicht. München 1980, Piper.
HEBB,D.O.: The organization of behaviour, New York 1949, John Wiley.
v.HOLST,E.: Zentralnervensystem, München 1974, dtv.
HUBEL,D.H. & WIESEL,T.N.: Receptive fields and functional architechture in two nonstriate visual areas, 18 & 19 of the cat. Journal of Neurophysiology, 28(1965), S.229-289.
KLOPF,A.H.: The hedonistic neuron: a theory of memory, learning and intelligence. Washington D.C. 1981, Hemisphere.
KOHONEN,T.: Associative memory: a system theoretic approach, Berlin-Heidelberg-New York 1977, Springer.
LINDSAY,P.H. & NORMAN,D.A.: Human information processing: An introduction to psychology, New York ^{2}1977, Academic Press (Deutsch: Einführung in die Psychologie: Informationsaufnahme und -verarbeitung beim Menschen. Berlin-Heidelberg-New York 1981, Springer)
LORENZ,K. & KREUZER,F.: Leben ist Lernen, München 1981, Piper.
v.d.MALSBURG,Ch. & WILLSHAW,D.: Co-operativity and brain organization. Trends in Neuroscience, April 1981, S.80-83.
MARR,D.: A Theory of Cerebral Neocortex. Proc.R.Soc.London, Ser.B, No.176, S.161.
McCULLOCH,W.S. & PITTS,W.: A logical calculus of the ideas immanent in nervous activity. Bull. Math.Biophys. 5(1943), S.115.
MILLER,G.A., GALANTER,A. & PRIBRAM,K.H.: Plans and the structure of behavior. New York 1960, H.Holt (Deutsch: Strategien des Handelns - Pläne und Strukturen des Verhaltens. Stuttgart 1973, Klett)

MINSKI,M.: K-Lines: A theory of memory. Cognitive Science 4(1980), S.117-133
MORTIMER,J.A.: A cellular model for mammalian cerebellar cortex. University of Michigan Technical Report. LCG 107, 1970.
NAKANO,K.: Associatron - a model of associative memory. IEEE Transactions, Vol. SMC-2, 1972
NEISSER,U.: Cognitive Psychology. New York 1967, Meredith (Deutsch: Kognitive Psychologie, Stuttgart 1974, Klett)
v.NEUMANN,J.: The computer and the brain. New Haven 1958.
v.NEUMANN,J.: Theory of self-reproducing automata. Edited and completed by Arthur W.Burks, Urbana and London 1966, University of Illinois Press.
NEWELL,A. & SIMON,H.: Human problem solving. Englewood Cliffs, N.Y. 1972, Prentice Hall.
NORMAN,D.A.: Twelve issues for cognitive science. Cognitive Science 4(1980), S.1-32.
PALM,G.: Neural Assemblies. Berlin-Heidelberg-New York 1982, Springer.
REICHL,E.R.: Computermodelle zum menschlichen Gedächtnis. In: Schauer,H. u. Tauber,M.: Informatik und Psychologie, Wien u. München 1982, Oldenbourg.
ROSENBLATT,F.: Principles of neurodynamics: perceptrons and the theory of brain mechanisms. Washington 1982, Spartan Press.
RUMELHART,D.E.: An introduction to human information processing, New York 1977, Wiley.
SIMON,H.A.: Cognitive Science: The newest science of the artificial. Cognitive Science 4(1980), S.33-46.
STEINBUCH,K.: Die Lernmatrix. Kybernetik 1(1961), S.36
WIENER,N.: Cybernetics, New York 1948, Wiley.
WILLWACHER,G.: Fähigkeiten eines assoziativen Speichersystems im Vergleich zu Gehirnfunktionen, Biol.Cybern. 24(1976), S.181.

Eingegangen am 25. Februar 1984

Anschrift des Verfassers: Dr. R.Kalb, Psychiatrische Universitätsklinik, Schwabachanlage 6 und 10, D-8520 Erlangen

Learning by Computer Programme as a Model for Learning in the Brain (Summary)

This article explores the conditions that enable learning: an information processing system in communication with its environment and spurred on by its own activity uses its initial configuration as well as a given set of rules to set up hypotheses that can be confirmed or repudiated by a success or failure response, if so desired. This is followed by an investigation of the salient features of neuronal networks starting with W.S.McCulloch and W.Pitts as well as D.O.Hebb. This article concludes with a description of the author's own model, which is also illustrated by means of a short computer programme.

Lernado per komputila programo kiel modelo de lernado en la cerbo (resumo)

Ĉi artikolo esploras la kondiĉojn ebligantajn lernadon: informprilabora sistemo komunikanta kun sia medio kaj instigata far sia propra agado uzas kaj sian komencan konfiguracion kaj donitan regularon por starigi hipotezojn kiuj estas konfirmataj aŭ malkonfirmataj per sukceso resp. malsukceso, se oni deziras. Sekvas esploro pri la elstaraj ecoj de neŭronaj retaroj ekde W.S.McCulloch kaj W.Pitts kaj ankaŭ D.O.Hebb. Ĝi konkludas per priskribo de propra modelo de la aŭtoro por kiu li ankaŭ prezentas komputilan programon.

Raporto de la Iniciatgrupo AIS de Eŭropa Klubo pri la plenumita preparlaboro cele la starigon de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) Sanmarino (Dua parto)

Raporto pri la Unua, Sanmarina Universitata Sesio (SUS) cele la inaŭguron de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) RSM

La 1-a SUS (Sanmarina Universitata Sesio) okazis sub la aŭspicoj de Iliaj Moŝtoj, la Kapitanoj Regantaj, cele la inaŭguron de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) RSM de la 27a de decembro 1983 ĝis la 7a de januaro 1984 (1683 pfR) en San Marino. Organizis ĝin la Ministerio pri Klerigado kaj Kulturo de la Respubliko San Marino kunlabore kun la scienca konsilantaro, la itala sekcio kaj la sanmarina grupo de la Societo por Lingvolim-transpaŝa Eŭropa Interkompreniĝo (Eŭropa Klubo) r.a.

La programo (stato: 1983-12-07 - la provizoran programon diskonigis grkg/Humankybernetik 3/83, p.151-152) anoncis 11 sciencajn kursojn kaj 33 sciencajn prelegojn de 22 sciencistoj proponitaj kiel profesoroj de la starigota AIS (komparu la koncernajn sciigojn en grkg/Humankybernetik 2/1983 kaj 4/1983), kaj de 16 sciencistoj proponitaj kiel AIS-adjunktoj. 10 de tiuj anoncitaj kursoj kaj 25 de la anoncitaj prelegoj fakte okazis, nome tiuj de la profesoroj Kurd ALSLEBEN (D), Helmar FRANK (D), HÁSZPRÁ Otto (H), Ivo LAPENNA (GB), Christo MARINOW (BG), MESZÁROS Bela (H), Krzysztof MIGON (PL), Vladimir MUŽIĆ (YU), Paul NEERGAARD (DK), Fabrizio PENNACCHIETTI (I), Kiril POPOV (BG), Bozidar POPOVIĆ (YU), Hans-Dietrich QUEDNAU (D), Ian McKenzie RICHMOND (CDN), SZERDAHELYI István (H), Josip VRANČIĆ (YU) kaj Klaus WELTNER (D), kaj de la proponitaj adjunktoj Carlo AGOSTINI (I), Helmut ANGSTL (D), Wim DE SMET (B), Giordano FORMIZZI (I), Adolf HÜBNER (A), Rudolf KOPPEL (PL), François LO JACOMO (F), Hans-Michael MAITZEN (A), Dan MAXWELL (USA/D), Claude ROUX (F), Richard SCHULZ (D), François SIMONNET (F/ET) kaj Lothar WEESER-KRELL (D). Ne okazis unu kurso kaj ok sciencaj prelegoj anoncitaj de la profesoroj Cesar APREOTESEI (R), Ignaz BOCIORT (R), Stoyan DJOUDJEV (BG), Rul GUNZENHÄUSER (D) kaj Karel MACHA (D) kaj de la antaŭviditaj adjunktoj Sergej KRAJNOV (SU), Roland PIETSCH (D) kaj OUYANG Wendao (CHN). Anstataŭe okazis 8 neanoncitaj sciencaj prelegoj, nome de la profesoroj Cezar BUDA (R), Aureliano CASALI (RSM) kaj Oton PANCER (YU) kaj de la proponotaj adjunktoj Antono ALONSO NUÑEZ (E), Stelian BAJUREANU (R), Lothar HOFFMANN (D), Jerzy LEYK (PL) kaj Rüdiger SACHS (D). - La nur aŭskultinta partoprenintaro (studentoj kaj finstudintoj de pluraj fakoj kaj eĉ diversaj universitatnivelaj profesoroj kaj docentoj) ne estas komplete registrita. - Ankaŭ la lingvokursoj kaj la eroj de la kadra programo grandparte realiĝis. - Krom la kotizpagintaj partoprenintoj la jenaj institucioj ebligis materie la okazigon de la 1-a SUS:

- la ministerio pri Klerigado kaj Kulturo de RSM, kiu senpage havigis salonojn en la kongrespalaco kaj gimnazio,
- la scienca konsilantaro, la Itala Sekcio kaj la Sanmarina Grupo de Eŭropa Klubo, membroj de kiuj elspezis multon precipe por preparaj vojaĝoj, telefonado kaj letero-dissendado,
- la Institut für Kybernetik Berlin&Paderborn, kiu zorgis pri la kompostado kaj presado de programoj, cirkuleroj kaj laborpresaĵoj,
- la Istituto di Cibernetica San Marino, kiu senpage ebligis kopiadon kaj havigis prelegsalonon kaj projekciilon,
- la Cybernetics Academy Odobleja, kiu sendis kvar membrojn siajn al la 1-a SUS kaj
- UEA, kiu sendis la direktoron de sia scienca eldoncentro Budapest.

La partopreno de pliaj 10 sciencistoj el 4 landoj kun transpagaj problemoj eblis pro la 2.120.950,-LIT (ĉ. 3.535,- DM) de „solidareca kaso“, kiun starigis kun la aprobo de la provizora Senato por la 1-a SUS prof. H.Frank (D), kaj al kiu ankaŭ donacis Myriam Michelotti (RSM) (673. 750,- LIT) kaj la Fondation Européenne Dragan (365.000,- LIT).

La solena malfermo okazis dum la mateno de la 28a de decembro en la Kongrespalaco de San Marino; ĉeestis la Kapitanoj Regantaj. Post salutvortoj de la sanmarina reprezentantino de Eŭropa Klubo, Marina Michelotti, post alparolo de la Ministrino por Klerigado kaj Kulturo, Fausta Morganti, kaj post salutvortoj de la sanmarina ambasadorino ĉe UNESKO, de la sanmarina observantino ĉe la Eŭropa Konsilantaro, de la episkopo, kaj de la prezidanto de la Akademio de Esperanto, okazis la jena inaŭgura parolado de prof. d-ro Helmar G.Frank:

(daŭrigo: paĝo 88)

(daŭrigo de paĝo 87)

Viaj ekscelencoj, la kapitanoj regantaj!
Ministra moŝto!
Estimataj reprezentantoj de la publika vivo de la Respubliko SanMarino kaj de aliaj landoj!
Karaj gekolegoj kaj geamikoj!

Historia momento ofte nur ŝajnas esti momento - por tiuj, kiuj de fore observas. Por tiuj, kiuj partoprenas, temas pri tuta momentaro. Ankaŭ tiu ĉi hodiaŭa momento nur estas kulmino de tuta serio de momentoj, al kiuj indas iomete malantaŭenrigardi.
Antaŭ du jaroj kaj duono la unua tia momento okazis, kiam nia kolegino Marina Michelotti kuraĝis transdoni leteron - siatempe ankoraŭ necese en itala traduko - al la ministrino d-rino Fausta Morganti. Per tiu ĉi letero, kiun mi estis skribinta en mia siatempa kvalito de respondeculo pri politikaj aferoj en la estraro de Eŭropaklubo, mi sugestis la projekton de Internacia Libera Universitato. Por mi estis nova grava momento, kiam mi ricevis telegramon de d-rino Fausta Morganti, per kiu ŝi invitis al interparolado pri tiu ĉi projekto. Ni kunvenis ĉi tie en San-Marino - kolego Pennacchietti kiel siatempa prezidanto de Eŭropaklubo, s-ino Michelotti kiel reprezentantino de Eŭropaklubo en la Respubliko SanMarino, kaj mi mem kiel siatempa vicprezidanto - por unua interparolado kun d-rino Fausta Morganti en la „Dikastero" de Klerigado kaj Kulturo. Venis nova grava momento, kiam ni, kolektinte la opiniojn de universitataj profesoroj el multaj landoj de pluraj kontinentoj, la duan fojon renkontiĝis en San-Marino, por pli detale prezenti la projekton. Mi tre ĝojas, ke mi vidas en tiu ĉi salono plurajn de tiuj, kiuj siatempe helpis nin per unuaj, plikonkretigaj ideoj por nia akademio - aŭ universitato - kreota.
Kompreneble laŭjure la plej grava momento estis tiam, kiam la Ŝtata Kongreso de SanMarino decidis krei tiun ĉi Akademion Internacian de la Sciencoj. Denove ni revenis por priparoli la projekton. Ni ricevis la taskon, prepari kadre de Eŭropaklubo la unuajn skizojn de statuto, de diversaj ekzamenregularoj k.t.p., kaj ni transprenis ankaŭ la taskon, organizi tiun ĉi Unuan Sanmarinan Universitatan Sesion.
Estas nun nia tasko, - la tasko de ni, sciencistoj el multaj landoj, kiuj alvenis jam aŭ alvenos dum la venontaj tagoj, - konstitui internacian sciencan kolegion, kiu estonte zorgos pri la faka laboro. Ĉar Eŭropaklubo kompreneble nur povis esti la katalizilo kaj unua iniciatinto de la nova institucio unika en la mondo.
Do, kiel mi diris, reliefiĝas survoje al nia Akademio tuta serio da historiaj momentoj. Sed se ne temas pri nur unu historia momento, tamen temas pri unika historia evento. Se ni bone laboras kaj sukcesas, kion mi esperas, tiam tiu ĉi evento povas konsisti en la jeno.
Antaŭ pli ol tricent jaroj komencis certa procezo de demokratiiĝo de la scienco. Siatempe la scienco ankoraŭ ne apartenis al ĉiuj. Ĝi apartenis nur al tiuj, kiuj antaŭe estis lernintaj tre malfacilan lingvon: la latinan. Sed gravaj sciencistoj - ĉi tie en la Itala lingvo-regiono Galileo Galilei, en la Franca lingvo-regiono René Descartes - komencis en la deksepa jarcento publikigi en la regiona, etna lingvo. Ili sciis kaj diris, ke la kapablo racie pensadi ne dependas de la kono de iu speciala lingvo, ekzemple de la latina, sed ke la kapablo racie pensadi apartenas al ni ĉiuj. Tio estis unua paŝo al la demokratiiĝo de la sciencoj. Sed oni ne povis longe preteratenti la fakton, ke scienco ne estas realigebla per ĉiuj unuopuloj dise. Scienco postulas kunlaboradon. Kunlaborado povas kompreneble ne okazi sen interparolado, do ne sen lingvo. Je la komenco sufiĉis la unuopaj etnaj lingvoj. Sed iom post iom kreskis denove la bezono internacie komuniki, kio ja eblis antaŭe, kiam oni havis nur unu sciencan interkomprenigilon: nome la latinan lingvon.
La unua paŝo al internacia, *neŭtrala* lingvo por interkompreniĝi science estis la propono de neŭtrala mezursistemo. Oni ne prenis iujn kvazaŭ „naturajn" mezurunuojn jam ekzistantajn, kiel ekzemple la „piedon". Ĉar tia mezurunuo diferencas en la diversaj landoj: la piedoj ja malsamgrandas. Jam kelkaj jaroj post la morto de Galileo Galilei oni proponis la metran sistemon. Kompreneble oni povis siatempe riproĉi al la proponintoj de ĉi tiu neŭtrala kaj racia sistemo la subtenon de mezursistemo „artefarita", kvankam ja funkciis jam tiom da „naturaj" mezuroj. Daŭris cent tridek jaroj, ĝis kiam la unua lando - estis Francio - per sia parlamento decidis adopti la metran sistemon. Kaj preskaŭ daŭris alian jarcenton ĝis la t.n. Metra Konvencio, kiun subskribis 1875 dekok plej gravaj ŝtatoj de la mondo. Estas bona espero, ke ĝis la fino de nia jarmilo eĉ en Usono oni enkondukos praktike la metran sistemon - pli ol tricent jaroj post la unua propono!
Tiu metra sistemo, uzata kiel komuna, neŭtrala kodo por kvantoj, jam helpas multe al la sciencistoj eviti traduklaboron inter diversaj naciaj mezuroj. Sed intertempe la bezono al internacia scienca komunikado multe kreskis, sekve la manko de komuna interkompreniĝilo, kio estis la latina lingvo, pli kaj pli sentiĝis - kaj oni trovis pseŭdosolvon ne demokratan: nome interkompreniĝi per kelkaj malmultaj lingvoj de grandaj potencoj. Tiel oni hodiaŭ ja havas demokratiecon de la scienco en la unuopaj landoj, t.e. kvazaŭ „vertikalan" demokratiecon, ĉar la scienco ne plu estas rezervita al privilegiitaj sociaj tavoloj latine parolantaj, sed oni an-

(daŭrigo: paĝo 89)

(daŭrigo de paĝo 88)

koraŭ ne havas „horizontalan" demokratiecon, nome demokratiecon en la scienca mondo internacia, ĉar ankoraŭ ekzistas privilegiitaj nacioj, do: denaske privilegiitaj sciencistoj, kio malakordiĝas kun la principo de demokratieco.
Por akiri demokratiecon mondskalan sen perdi la jam akiritan nacinivelan demokratiecon de la scienco estas ree bezonata komuna neŭtrala scienca lingvo, sed ne plu lingvo lernebla nur far privilegiita socia tavolo. Tia lingvo evidente nur povas troviĝi inter la proponoj de planitaj, t.e. de konscie kreitaj lingvoj. Tia lingvo povas fariĝi lingva kompletigo de la metra sistemo. Kaj tia lingvo havos pli ol la du avantaĝojn kiujn mi jam menciis: ĝi ne nur estos neŭtrala kaj ne nur facile lernebla, sed ĝi ankaŭ povas ĝuste pro sia planiteco multe pli bone kontentigi sciencajn bezonojn. Tion aludis jam la iniciatoro de la planita lingvo pleje disvastiĝinta en la mondo, nome de la Internacia Lingvo. Mi citas el „lingva respondo 13" de d-ro Ludoviko Zamenhof, publikigita 1906 en „La Revuo":
„Tamen la diferenco inter lingvo natura kaj lingvo artefarita konsistas en tio, ke dum en la unua oni devas uzi *nur* tiujn formojn kiujn uzas bonaj verkistoj kaj uzadoj de formo pli logika estas *malpermesata* - en lingvo artefarita ĉiu havas la rajton uzi formon pli logikan kvankam neniu ĝis nun ĝin uzis."
Nekontesteble la Internacia Lingvo intertempe posedas propran tradicion. Ekzistas ja hodiaŭ ne plu nur la dekses gramatikaj reguloj, la kelkdek afiksoj kaj la kelkcent fundamentaj vortradikoj, sed ekzistas riĉa literaturo - inkluzive poezion - en la Internacia Lingvo, dank'al tuta movado, nome la Esperanto-Movado, en kiu vivas tiu ĉi lingvo. Sed tio tute ne ŝanĝis la bazan naturon, la esencon, de la Internacia Lingvo: la fakton, ke ĝi estas konscie kreita, do principe racia kaj ne nur neŭtrala.
Per ĉi tiu konsidero ni alvenas al la pravigo de la konjekto, ke la kreo de nia Akademio Internacia de la Sciencoj povas fariĝi historia evento. Ĝi povas fariĝi historia evento, kondiĉe ke ekestas kompromiso, kiun mi kuraĝas nomi „historia kompromiso": kompromiso inter la sciencistaro unuflanke kaj la Esperanto-Movado aliflanke (movado, al kiu ja apartenas ne malmultaj plej progresemaj sciencistoj en ĉiuj kontinentoj).
Ni sciencistoj ne bezonas ion alian ol *lingvon por interkompreniĝi*; ni do *ne* bezonas - en nia kvalito kiel sciencistoj! - la kulturajn valorojn, la tradiciojn de la Internacia Lingvo. Tio, kion ni bezonas, estas nur kodo por komuniki niajn pensojn kaj ekkonojn; kaj la Internacia Lingvo estas multe pli moderna kaj multe pli taŭga kodo ol la angla lingvo. Ekzistas altrudemaj homoj, kiuj, se iu volas aĉeti pordon, volas tuj vendi al li tutan domon. Ni sciencistoj bezonas la pordon „Internacia Lingvo", ni ne bezonas kiel sciencistoj la tutan domon kiun oni nomas „Esperanto". Mi tute ne neas, ke la domo pli valoras ol nur la pordo. Sed por niaj pure sciencaj celoj sufiĉas la pordo, kiu estas la lingvo mem. En tio kuŝas la eblo de historia kompromiso inter la Esperanto-Movado kaj la sciencistoj de la mondo. La starigo de tiu ĉi Akademio Internacia de la Sciencoj ja ankoraŭ ne plaĉas al ĉiuj sciencistoj. Sed progreso ĉiam komencas nur ĉe minoritato. Subtenas nin ĝis nun ankoraŭ nur minoritato de la sciencistoj; mi esperas, ke subtenas nin jam majoritato de la Esperantistoj. La tuta sciencistaro devas ekkompreni, ke la Internacia Lingvo pro sia racia planiteco estas la plej taŭga scienca interkompreniĝilo. Kaj la tuta Esperantistaro devas kompreni, ke ne necesas, eĉ malutilus, enkonduki la tutan Esperantan kulturon en tiun ĉi nian Akademion. Por reliefigi tion, ni proponis - kaj oni pli kaj pli akceptas - ke oni iomete diversssence uzu la du nomojn de la lingvo ekplanita de Zamanhof: la originalan nomon „Internacia Lingvo" kaj la pli malfrue aldonitan kromnomon „Esperanto". „Esperanto" signifu ne nur la neŭtralan kodon, sed ankaŭ la kulturajn valorojn, la literaturon, la movadon, la tradicion. Per „Internacia Lingvo" ni komprenu nur la lingvon mem, la science utilan kodon. La Internacia Lingvo al la sciencistoj, la *tutan* Esperanton al la Esperantistoj!
Permesu al mi voĉlegi tie ĉi la unuanime akceptitan unuan punkton de la fina rezolucio, kiun la Iniciatgrupo de ĉi tiu nia Akademio transdonis al la Ministrino por Klerigado kaj Kulturo:
„Ni konstatas, ke nek venis la iniciato por la fondo de la Akademio Internacia de la Sciencoj el la Esperanto-Movado, nek kontribuis ĝis nun iu Esperantista organizaĵo al la starigo de AIS, nek estu celo de AIS konkurenci kun la Akademio de Esperanto aŭ varbi por la Internacia Lingvo. Ĉi tiu lingvo (krome akceptata, ĉar efika por modernaj informiloj, far kibernetikistoj) nur servas kiel unu el la oficialaj kaj laboraj lingvoj de AIS. La Internacia Lingvo tamen estas nemalhavebla komunikilo de AIS pro la neŭtraleco de San Marino kune kun la fakto, ke junaj sciencistoj de orienteŭropaj landoj multe pli facile ol en la Angla aŭ la Franca esprimiĝas en la Rusa lingvo, kiu inverse malofte estas komprenata de la okcidenteŭropaj sciencistoj. - Por ke ne ekestu ajna miskompreno pri la nur rimeda rolo de la Internacia Lingvo en AIS, ni insiste rekomendas eviti en ĉiuj oficialaj tekstoj kaj gazetarinformoj rilate AIS la kromnomon „Esperanto" de la Internacia Lingvo sed uzi nur ĉi tiun originalan nomon, eventuale mallongigite kiel I.L. aŭ ILo."
Se tiun ĉi historian kompromison akceptos ambaŭ flankoj, la sciencistoj kaj la Esperantistoj, mi fidas, ke iam oni diros, ke tiu ĉi evento hodiaŭa akcentas la duan paŝon al la demokratiiĝo de la scienco. -

Oficialaj Sciigoj de TAKIS

- Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko -

Prezidanto: Prof.Inĝ. Aureliano CASALI, San Marino (RSM)
Ĝenerala Sekretario: D-ro Dan MAXWELL, Berlin (D)
Adreso: Dr.D.Maxwell, Technische Universität Berlin, FB1, Ernst-Reuter-Platz 7, 8.OG, D-1000 Berlin (D)
Kontoj: „Speciala konto Kibernetiko de Dr.D.Maxwell“, P.K.n-ro 467763-106, poŝtĉeka oficejo Berlin-West
„Konfida konto TAKIS /Prof.Dr.Frank & Dr.Maxwell“, n-ro 608064901 ĉe Bank für Handel und Industrie, Berlin, BLZ 100 800 00
Redakcia respondeco: d-ro Dan Maxwell

Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko (TAKIS)
Prezidanto: Profesoro Aureliano CASALI, San Marino (RSM); Vicprezidantoj: Prof. d-ro BUDA, Bucuresti (R); Dr. BROSZKO Peter, Budapest (H); Prof. CHEN Yuan, Beijing (CHN); Prof. d-ro Helmar FRANK, Paderborn (D); Prof. d-ro Vladimir MUŽIĆ, Zagreb (YU).
Ĝenerala Sekretario, kasisto kaj redakcia respondeculo: D-ro Dan MAXWELL (USA), momente Technische Universität Berlin, FB Linguistik, Ernst-Reuter-Platz, D-1000 Berlin.
Konto: Speciala Konto TAKIS 608064901 ĉe Bank für Handel und Industrie (BLZ 10080000) D-1000 Berlin 30.
Oficiala sciigo de 1984-02-13:

STATUTO

§1: Titolo kaj Sidejo

Estas fondita la Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko (l'Associazione Mondiale di Cibernetica, Informatica e Teoria dei Sistemi), mallongigita TAKIS.
La laŭjura sidejo de TAKIS estas en la respubliko de San Marino.
La laŭjura sidejo povas esti translokigita al alia neŭtrala lando per simpla decido de la komitato.

§2: Celoj

Tiu ĉi asocio celas faciligi tutmondan kunlaboron inter kibernetikistoj per:
a) organizo de tutmondaj kongresoj pri kibernetiko, en diversaj landoj, ĝenerale ĉiun kvaran jaron;
b) kunlaboro kun aliaj institucioj kaj asocioj;
c) partopreno en sciencaj esplorprojektoj; publikigo kaj diskonigo de sciencaj rezultoj, pere de revuoj aŭ alispecaj eldonaĵoj.
TAKIS celas krome reprezenti kibernetikistojn en rilatoj kun UNESKO, Akademio Internacia de Sciencoj en San Marino, kaj aliaj internaciaj institucioj.

§3: Oficialaj Lingvoj

La oficialaj lingvoj de TAKIS estas:
a) la oficiala lingvo en la lando de la laŭjura sidejo
b) la Internacia Lingvo (ILo)
c) la oficialaj lingvoj de UNESKO
Ĉiu organo de TAKIS rajtas difini siajn laborlingvojn konforme al la ĝenerala regularo. Dum la kongresoj estas uzataj la Lingvo Internacia (Esperanto), la franca, la angla, kaj ankaŭ la lingvoj oficialaj en la lando en kiu okazas la kongreso, kondiĉe ke la organiza komitato garantias tradukadon minimume al la Internacia Lingvo. Laŭ la sama kondiĉo estas permesataj ankaŭ aliaj lingvoj.

§4: Membreco

Rajtas aliĝi al TAKIS ĉiuj fizikaj kaj juraj personoj kies agado ne malakordas kun ĝiaj planoj kaj celoj. TAKIS konsistas el: a) individuaj ordinaraj membroj, honoraj membroj kaj bonfarantaj membroj; b) aliĝintaj asocioj.
Ies peto fariĝi individua ordinara membro devas esti apogita de almenaŭ du ordinaraj membroj. Pri akcepto decidas la estraro, kiu ankaŭ fiksas la membrokotizon.
Pro apartaj meritoj al la Asocio la komitato rajtas nomi honorajn membrojn. La honoraj membroj ne devas pagi kotizon.
Rajtas aliĝi kiel bonfaranta membro ĉiu fizika aŭ jura persono kiu pretas finance kaj morale subteni la celojn de TAKIS, post akcepto fare de la estraro.
Rajtas aliĝi kiel aliĝinta asocio ĉiu asocio aŭ institucio kiu aktivas sur la sama kampo kiel TAKIS, post akcepto fare de la Komitato kaj pago de la jarkotizo.
Aliĝinta asocio kun minimume 100 membroj rajtas partopreni per unu voĉo en la laboro de la komitato. Institucioj kaj asocioj kiuj ne atingas tiun nombron da membroj rajtas partopreni en la laboro de la komitato, sed sen voĉdonrajto.

(daŭrigo: paĝo 91)

(daŭrigo de paĝo 90)

Membreco ĉesas pro a) rezigno b) ne pago de la kotizo por la koncerna jaro, c) eksigo fare de la Estraro pro grava kialo, pri kiu la membro estu avertita per registrita letero. Dum unu monato post ricevo de la letero, la eksigita membro rajtas apelacii al la komitato.

§5: Gvidorganoj

La gvidorganoj de la Asocio estas:
a) la Ĝenerala Asembleo
b) la Komitato
c) la Estraro
d) la Revizoroj

§6: Ĝenerala Asembleo

La Ĝenerala Asembleo estas kunvokata de la Prezidanto okaze de la Tutmondaj Kongresoj pri Kibernetiko kaj konsistas de ĉiuj membroj. Post la unua kunvoko la Ĝenerala Asembleo validas kun unu pli ol la duono de la membroj. Post la dua kunvoko, kiu povas okazi unu horon post la unua kunvoko, la asembleo validas sendepende de la nombro de partoprenantoj.
La kunvokoj devas indiki la tagon, la lokon kaj la tempon de la kunsidoj kaj la temoj de la tagordo.
Ĉiu membro havas rajton al unu voĉdono.
La voĉdonado povas okazi per kaŝa balotado, per vokado de nomoj, aŭ per leviĝo kaj sidiĝo.
La formo de la voĉdonado estas decidenda de la sama Asembleo per malkaŝa voĉdono.
Kaze de egaliĝo decidas la voĉdono de la Prezidanto.
La decidoj baziĝas sur la duono plus unu de la ĉeestantaj voĉdonoj.
Eksterordinara Ĝenerala Asembleo devas esti kunvokita de la prezidanto post decido de la Komitato aŭ skriba postulo de almenaŭ 20% de la membroj laŭregule akceptitaj de TAKIS.
Taskoj de la Ĝenerala Asembleo:
a) difini la ĝeneralan laborplanon de TAKIS;
b) prijuĝi la laboron plenumitan de TAKIS;
c) elekti la komitatanojn kiuj ne reprezentas aliĝintajn asociojn kaj ricevi rezignojn;
d) nuligi (I) ĉiun decidon de la aliaj gvidorganoj kiu havas efikon kontraŭ la celoj de TAKIS (II) erarojn, kiel ajn atingitajn.
e) decidi pri statutŝanĝoj, pri kunfandiĝo kun alia asocio, kaj pri eventuala malfondo de TAKIS, surbaze de du trionoj de la voĉdonoj esprimitaj.

§7: Komitato

La Komitato konsistas el dekkvin individuaj membroj ordinaraj kaj unu reprezentanto de ĉiu asocio aliĝinta.
La Komitato kunsidas minimume unufoje jare post kunvoko de la prezidanto.
Taskoj de la Komitato:
a) elekti la Prezidanton kaj la membrojn de la estraro;
b) decidi pri ĉiu demando ne rezervita al la Ĝenerala Asembleo;
c) decidi pri akcepto aŭ malakcepto de novaj aliĝintoj;
d) fiksi la jarkotizojn;
e) difini kaj aprobi la jaran buĝeton kaj laborplanon.
f) akcepti novajn aliĝintajn asociojn;
Ĝiaj decidoj, atingitaj surbaze de unu pli ol la duono de la voĉdonoj donitaj en malkaŝa voĉdonado, estas transskribendaj en taŭgan registron subskribitan de la Prezidanto kaj la Ĝenerala Sekretario.

§8: Estraro

La Estraro konsistas el:
a) Prezidanto, b) du ĝis kvin vic-prezidantoj, c) Ĝenerala Sekretario, d) Kasisto, e) sep aliaj membroj; la estraranoj (b-d) estas elektendaj dum la estrara kunveno.
La Estraro kunsidas minimume dufoje jare.
Ĝiaj taskoj estas:
a) efektivigi la decidojn de la komitato;
b) akcepti la novajn membrojn kaj decidi pri eksigoj;
c) decidoj pri lokoj kaj datoj de la kongresoj.
Ĝiaj decidoj, atingitaj surbaze de unu pli ol la duono de la voĉdonoj donitaj dum malkaŝa voĉdonado, estas kolektendaj en taŭgan registron subskribitan de la Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario.

§9: Financaj rimedoj

La financaj rimedoj de TAKIS estas (a) jarkotizoj, (b) donacoj, (c) subvencioj kaj (d) enspezoj surbaze de venditaj varoj.

§10: Revizoroj

TAKIS estas kontrolata de du revizoroj, nomumitaj de la Asembleo Ĝenerala. Iliaj taskoj estas (a) la ekzameno de la administrado kaj de la bilancoj (b) la verkado de jarraporto por prezentado al la komitato. Ili estas invitataj partopreni en la kunsidoj de la Komitato, sen rajto al voĉdono.

§11: Ĝeneralaj Reguloj

En kazo de malfondo de TAKIS, la Ĝenerala Asembleo decidos pri detaloj rilate al financaj aferoj kaj nomumos unu aŭ pli respondeculojn.
Pri aferoj ne pritraktitaj en la nuna statuto oni serĉu la gvidon de la leĝoj kaj kutimoj rilataj.

(Anzeige)

Bernd Fischer / Siegfried Lehrl (Hrsg.)

Gehirn-Jogging

Biologische und informationspsychologische Grundlagen des zerebralen Jogging

VIII/229 Seiten, 15 x 22,5 cm, DM 38,-
ISBN 3-87808-175-8

Gehirn-Jogging läßt an das körperliche Jogging denken, die inzwischen weithin anerkannte Art, sich körperlich fit zu halten. Der Ausdruck „Gehirn-Jogging" erinnert nicht unbeabsichtigt an die Funktion des Gehirns und an die geistigen Vorgänge. Es steht für geistiges Dauertraining.

„Wer rastet, der rostet" scheint nach verschiedenen Untersuchungen zu gelten: körperliche und geistige Aktivität können korrelieren mit Zufriedenheit, Gesundheit und Langlebigkeit. Liegt das daran, daß diese Anlagen auch zu höherer Rüstigkeit disponieren? Oder führt auch umgekehrt eine Erhöhung der Aktivität zur Zufriedenheit, Gesundheit und Langlebigkeit? Es gibt durchaus, wenn auch als Beweise noch nicht vollständig befriedigende, Hinweise auf den letzteren Schluß. Bereits seine Möglichkeit ist ein Grund, sich mehr mit dem Gehirn-Jogging zu befassen. Es kann der Gesundheitsvorsorge des einzelnen dienen, vermag seinem Leben vielleicht nicht nur Jahre, sondern auch Lebensqualität hinzuzufügen. Für Patienten mit frühzeitigen Alterserkrankungen oder mit Hirnfunktionsstörungen und Hirnschädigungen sollte Gehirn-Jogging sogar zum festen Behandlungsprogramm gehören.

Anläßlich der 4. Klausenbacher Gesprächsrunde trafen sich angesehene Vertreter verschiedenster wissenschaftlicher Fachrichtungen, um sich mit dem Gehirn-Jogging zu befassen und dabei eine Bestandsaufnahme über dieses Gebiet vorzunehmen. Absicht war es, einige Lichtpunkte in die „ägyptische Finsternis" dieses komplexen Themas zu setzen. Das vorliegende Buch enthält die Ergebnisse jener interdisziplinären Runde.



Gunter Narr Verlag Tübingen

Richtlinien für die Manuskriptabfassung

Artikel von mehr als 12 Druckseiten Umfang (ca. 36.000 Anschläge) können in der Regel nicht angenommen werden; bevorzugt werden Beiträge von maximal 8 Druckseiten Länge. Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 1982 regelmäßig auch Artikel in den drei Kongreßsprachen der Association Internationale de Cybernétique, also in Englisch, Französisch und Internacia Lingvo. Die verwendete Literatur ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluß des Beitrags zusammenzustellen - verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b" usf.. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und -jahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenbeiträge werden nach dem Titel vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. - Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem Zusatz „a" etc.) zitiert werden. - Bilder (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) einschl. Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu numerieren und nur so zu erwähnen, nicht durch Wendungen wie „vgl. folgendes (nebenstehendes) Bild". - Bei Formeln sind die Variablen und die richtige Stellung kleiner Zusatzzeichen (z.B. Indices) zu kennzeichnen.
Ein Knapptext (500 - 1.500 Anschläge einschl. Titelübersetzung) ist in mindestens einer der drei anderen Sprachen der GrKG/Humankybernetik beizufügen.
Im Interesse erträglicher Redaktions- und Produktionskosten bei Wahrung einer guten typographischen und stilistischen Qualität ist von Fußnoten, unnötigen Wiederholungen von Variablensymbolen und übermäßig vielen oder typographisch unnötig komplizierten Formeln (soweit sie nicht als druckfertige Bilder geliefert werden) abzusehen, und die englische oder französische Sprache für Originalarbeiten in der Regel nur von „native speakers" dieser Sprachen zu benutzen.

Direktivoj por la pretigo de manuskriptoj

Artikoloj, kies amplekso superas 12 prespaĝojn (ĉ. 36.000 tajpsignojn) normale ne estas akceptataj; preferataj estas artikoloj maksimume 8 prespaĝojn ampleksaj. Krom germanlingvaj tekstoj aperadas de 1982 ankaŭ artikoloj en la tri kongreslingvoj de l'Association Internationale de Cybernétique, t.e. en la angla, franca kaj Internacia lingvoj.
La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo, en kazo de samjareco aldoninte „a", „b" ktp.. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De disaj publikaĵoj estu - poste - indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj jaro de la apero, kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. - En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). - Bildojn (laŭeble presprete aldonendajn!) inkl. tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii ilin nur tiel, neniam per teksteroj kiel „vd. la jenan (apudan) bildon". - En formuloj bv. indiki la variablojn kaj la ĝustan pozicion de etliteraj aldonsignoj (ekz. indicoj).
Bv. aldoni resumon (500 -1.500 tajpsignojn inkluzive tradukon de la titolo) en unu el la tri aliaj lingvoj de GrKG/Humankybernetik.
Por ke la kostoj de la redaktado kaj produktado restu raciaj kaj tamen la revuo grafike kaj stile bonkvalita, piednotoj, nenecesaj ripetoj de simboloj por variabloj kaj tro abundaj, tipografie nenecese komplikaj formuloj (se ne temas pri prespretaj bildoj) estas evitendaj, kaj artikoloj en la angla aŭ franca lingvoj normale verkendaj de denaskaj parolantoj de tiuj ĉi lingvoj.

Regulations concerning the preparation of manuscripts

Articles occupying more than 12 printed pages (ca. 36,000 type-strokes) will not normally be accepted; a maximum of 8 printed pages is preferable. From 1982 onwards articles in the three working-languages of the Association Internationale de Cybernétique, namely English, French and Internacia Lingvo will appear in addition to those in German. Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors, (abbreviated if necessary, should be indicated. Works by a single author should be named along with place and year of publication and publisher if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. - Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). - Illustrations (fit for printing if possible) should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. They should be referred to as such in the text and not as, say, "the following figure". - Any variables or indices occuring in mathematical formulae should be properly indicated as such.
A resumee (500 - 1,500 type-strokes including translation of title) in at least one of the other languages of publication should also be submitted.
To keep editing and printing costs at a tolerable level while maintaining a suitable typographic quality, we request you to avoid footnotes, unnecessary repetition of variable-symbols or typographically complicated formulae (these may of course be submitted in a state suitable for printing). Non-native-speakers of English or French should, as far as possible, avoid submitting contributions in these two languages.

Forme des manuscrits

D'une manière générale, les manuscrits comportant plus de 12 pages imprimées (env. 36.000 frappes) ne peuvent être acceptés; la préférence va aux articles d'un maximum de 8 pages imprimées. En dehors de textes en langue allemande, des articles seront publiés régulièrement à partir de 1982, dans les trois langues de congrès de l'Association Internationale de Cybernétique, donc en anglais, français et Internacia Lingvo.
Les références litteraires doivent faire l'objet d'une bibliographie alphabétique en fin d'article. Plusieurs œuvres d'un même auteur peuvent être énumérées par ordre chronologique. Pour les ouvrages d'une même année, mentionnez "a", "b" etc. Les prénoms des auteurs sont à indiquer, au moins abrégés. En cas de publications indépendantes indiquez successivement le titre (eventuellement avec traduction au cas où il ne serait pas dans l'une des langues de cette revue), lieu et année de parution, si possible éditeur. En cas d'articles publiés dans une revue, mentionnez après le titre le nom de la revue, le volume/tome, pages et année. – Dans le texte lui-même, le nom de l'auteur et l'année de publication sont à citer par principe (eventuellement complétez par "a" etc.). – Les illustrations (si possible prêtes à l'impression) et tables doivent être numérotées selon "fig. 1" etc. et mentionées seulement sous cette forme (et non par "fig. suivante ou ci-contre").
En cas de formules, désignez les variables et la position adéquate par des petits signes supplémentaires (p. ex. indices).
Un résumé (500–1.500 frappes y compris traduction du titre est à joindre rédigé dans au moins une des trois autres langues de la grkg/Humankybernetik.
En vue de maintenir les frais de rédaction et de production dans une limite acceptable, tout en garantissant la qualité de typographie et de style, nous vous prions de vous abstenir de bas de pages, de répétitions inutiles de symboles de variables et de tout surcroît de formules compliquées (tant qu'il ne s'agit pas de figures prêtes à l'impression) et pour les ouvrages originaux en langue anglaise ou en langue française, recourir seulement au concours de natifs du pays.